**N I A  V O Ĉ O**

## Madrida Esperanto-Liceo

San Alejandro 6-4ºB-Ext. 28005 Madrid
(Nur poŝta adreso)
Ni kunvenas lunde je la 18,30 en Rodríguez San Pedro 13-3º-7

Redaktas kaj eraras: Lupe Sanz **MARTO 2000**

Nia Voĉo estas legebla en internet ĉe la TTT-paĝo de Andaluzia Esperanto Unuiĝo:
http://www.ciudadfutura.com/esperanto

"11-A KONGRESO DE VALENCIA ESPERANTO-FEDERACIO KAJ MURCIO" 1-2, aprilo. Loko: La bela kaj historia urbo Requena, provinco de Valencia (Hispanio)

<u>HISPANIO</u>

Fakultato pri Filologio de la **Valencia** Universitato: oni petis, pere de la Departamento de Germana Lingvo, okazigi denove E-kurson en aprilo, kun valoro de 3 akademiaj kreditoj. Dum la lastaj kvar jaroj jam pli ol 200 gelernantoj ricevis la kreditojn kaj la atestilon. Ĉi jare la celo estas organizi du grupojn, unu el novaj gelernantoj por la Baza Kurso, kaj la alia por Perfektiga (Meza) Kurso, nur el gelernantoj kiuj jam ĉeestis la Bazan. Entute, pro spaco-manko, oni akceptos nur 50 plus 50 gelernantojn, tio faras entute 100.

En novembro, oni finis la trimonatan E-kurson en aŭlo de la Aŭtonoma Universitato de **Barcelono**. Organizita de KAE (Kultura Asocio Esperantista), ĝi estis la una tiaspeca kurso en kataluna universitato. Dek gelernantoj partoprenis la kurson kun kontentiga rezulto.

La Universitato de **Valladolid** subvenciis al d-rino Rafaela Urueña Alvarez pere de 75.000 ptoj. La subvencion petis d-rino Urueña kiel prelegantino, kadre de IKU, en la Universala Kongreso de Esperanto okazinta en Berlino pri la temo "De la homarana helpo al la homarana interveno en la aktuala Internacia Juro". La prelego de d-rino Urueña kune kun la aliaj prelegoj de IKU estis broŝurforme eldonitaj de UEA.

Laŭ propono de Marco Trevisán , 1999-11-10, la subrektorejo de la Aŭtonoma Universitato de **Madrido** aprobis la statutojn de studenta Esperanto-asocio "Asociación para la Difusión del Esperanto". La asocion kreis 8 membroj, studentoj pri filozofio, artohistorio, fiziko, ktp. Krom la informado, prioritata agado de la nova asocio estas la instruado.

La "Fundación de estudios sociales extremeños Pio Sopena" en **Hervás (Cáceres)** organizis du Esperanto-kursojn al kiuj ĉeestis 18 gelernantoj de Ekstremaduro, Valencio kaj Murcio. La Fondaĵo disponigis sian ejon kaj pagis la uzitajn lernolibrojn.

<u>ANGUITA MENCIIS ESPERANTON</u>

En la pasinta voĉdonado al Kataluna Parlamento, Julio Anguita en mitingo okazinta en Sabadell, diris: "estas bone posedi la du lingvojn, la katalunan kaj la kastilian kaj por la internaciaj rilatoj oni devas uzi tiun belan kaj mirindan lingvon, kiu estas esperanto."

<u>PILGRIMADO AL KOMPOSTELO</u>

Vidu *http://medweb.uni-muenster.de/~fischru/jak2000-o.html* pri la planata pilgrimado de Rudolf Fischer dum aŭgusto de 2000 al Santiago de Compostela. "Mi tre ĝojus, se mi survoje renkontos Esperantistojn aŭ se eĉ de tempo al tempo iu akompanos min dum iom da vojo".

<u>ESPERANTO EN INTERRETO</u>

La nova paĝaro de “Esperanto España” estas www.educar.org/Revistas/Esperanto, ĝin aktualigas Jesús de las Heras

ESPERANTO EN AMAS-MEDIOJ

La usona ĵurnalo “USA Today”, 2000-01-27, publikigis artikolon pri esperanto.

Unu el la demandoj de la konkurso El euromillón de Tele-5 estis Kiel oni diras “Feliz Navidad” en esperanto?. La konkursantoj bone respondis kvankam ne bone prononcis.

La revuo “Arrakis”, pri interneto, n-ro 3, 1999-12, informis bone pri la TTT-paĝo de HEF laŭ titolo “Idioma de viaje”

**NIA VOĈO MARTO 2000** 1999

VENONTAJ PROGRAMOJ EN MADRIDO

Ni kunvenas, lunde ekde la 18.30 h en RODRÍGUEZ SAN PEDRO 13-3º-7 Tel. 91 446 80 79.

Kursoj: Centro de Día Puente de Toledo. Mercedes Arteaga 18. Por triaaĝuloj.
Universidad Autónoma de Madrid. Lunde kaj merkrede 12-13h. Informas Marco Trevisán 915 617 613 <oxartum@esperanto.nu>

Prelego: 20-an de marto “Ankoraŭ pli malfacile…” Video pri cirko. J.F. Platas

En aparta folio ni inkludas intervjuon al Paquita Jiménez, la edzino de J.F. Platas kiu estis honorita per la premio Klara Silbernik. Ŝi ricevos la medalon dum la venonta kongreso en San Sebastián de los Reyes.

HEF ANGULO

Lunde kaj ĵaŭde (18,00 ĝis la 20,30 h) funkcias HEF-CO (Rodríguez San Pedro 13-3º-7). Aliajn tagojn kaj horojn uzu aŭtomatan respondilon aŭ fakson 91 446 80 79. Ankaŭ e-poŝto: admin@esperanto-es.org

Inter la 6a kaj la 9a de aprilo okazos la foiro pri lingvoj EXPOLINGUA 2000, kiel pasintjare HEF partoprenos kun budo laŭ la nomo Esperanto. Oni esperas tiel sukceson kiel la pasintan jaron.

## 59-a HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO- HEF KONGRESO

**29a Aprilo ĝis 1a de Majo 2000. San Sebastián de los Reyes (Madrid)**

*Informoj ĉe:* www.esperanto-es.org/kongreso/inicio.htm:

KOTIZOJ EŬROJ (PESETOJ)

| **Kategorioj** | **post 1a de marto** |
|---|---|
| **HEF-ano** | **39 (6.489)** |
| **Ne HEF-ano** | **45 (7.487)** |
| **Juna HEF-ano** | **27 (4.492)** |
| **Juna ne HEF-ano** | **33 (5.490)** |

1.- Pagu vian kotizon al- Caja Postal: 1302-0116-51-0024189825
2. Sendu la pagpruvilon kun viaj datumoj al oficejo de HEF.

PROGRAMO (Vidu aparta folio)

Jorge Camacho gvidos verk-atelieron. Interesiĝantoj kunportu al la kongreso siajn poemojn, rakontojn ktp. Tutmonda kulturo. Muziko, novaj libroj, poezio, interreto, literaturo, studado, scienco, kunsido, atelieroj, humuro, inyternacia kunlaborado, komputado, astronomio, debato, naturo, ekonomio… kaj